




Terra australis, 1589




Esperanto sub la Suda Kruco

Marto-Aprilo 2000
Numero 44 (vol.8, no.2)



ISSN 1039-9380



Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 44 (volumo 8, numero 2), Marto-Aprilo 2000

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

e-poŝto: esk@poboxes.com

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St Redfern, NSW 2016, Aŭstralio. E-poŝte: esperfed@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝte: hazgreen@tmba.design.net.au

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de Esperanto sub la Suda Kruco: "Ni vere bezonas artikolon pri ...?" Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon per e-poŝto, sur komputila disko (Mac aŭ MS-DOS [nur 3½"]), aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezzone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

La somerkursaro, kongreso, fondusoj, kaj ĝenerala kunveno de AEA	3
Estrarkunsido de NZEA	8
Retpaĝo de AEA	8
Oceania Komisiono aprobita	8
Intervjuo kun Kep Enderby	9
Universala komputila lingvo	11
Mortintaj ĉevaloj	12
Laŭ mia vidpunkto (Bob Felby)	13
La stranga afero ŝarko-brako	16
Two common fallacies about Esperanto (Marcel Leereveld)	16
Sukcesis en la ekzamenoj	19
E-mail addresses	19
Deziras Korespondi	20
Skribas la legantoj: Paul Desailly	20
Kep Enderby	21
Diversaĵoj	21
Literofteco	23
Rubriko de Odlo Bokserp	24
Auditor's report for AEA	25
Lastmomente	30

Recenzoj:

<i>William Auld 75 jaroj</i>	12
<i>Mokrokalvo la gigantegego</i>	12

Because of the lengthy auditor's report, an English Supplement does not appear in this issue.

ESK estas legebla per la Interreto:
<http://www.poboxes.com/esk/>

Limdato por artikoloj por la maja numero: la 14a de aprilo.

Kovrilbildo: Terra Australis, mapo desegnita de Abraham Ortelius, 1859. En la Speciala Kolekto de la Biblioteko Reid de la Universitato de Okcidenta Aŭstralio.



Esperanto-Kursaroj en La Sidneja Somerkursaro

Fotis Kam Lee

LA SOMERKURSARO TRA LA OKULOJ DE NIA VAGANTA RAPORTISTO ĜO TURVEY

Kiel nesperta verkanto por la gazeto, mi ne scias kion mi unue menciu pri la Somer-kursaro 2000 en Sidnejo.

Mi portis mian bebon Eric tra la tuta Somer-kursaro. Li estas unu-kaj-duon-jar-aĝa, tamen li estas eksterordinare sociema. Dum la kursaro li estis tiom kontenta renkonti multajn samideanojn kaj kiam oni devis disiĝi, li eĉ mansvingante diris “Ĝis la”, la unuan fojon. Kvankam mi ĉiam kuraĝigas lin paroli en la Korea lingvo, li ne faris tion ĝis nun. Do, mi ja vidis ke ĉi tiu somer-kursaro jam havas frukton belan kaj trovis ke Esperanto estas la lingvo kiu jam pli plaĉas al li. Alan kaj mi havas tiom da bonfortuno pro havi lin kiel nian bebon.

Nu, mi ne plu fanfaronu pri nia bebo. Bone, tio sufiĉas. Nun mi parolos pri la instruistoj. Mi havis klason kun Prof. Daniel Kane kaj S-ro ung-Kee Lee je progresinta-nivelo. Daniel prezentis kelkajn modernajn Esperantajn librojn kiuj reflektas la lastatempan uzadon de la lingvo. Nia unua stud-libro estis nomita “Murdo en Esperantujo”. Tra la leciono ni diskutis pri neologismoj, kulturo de Esperantio, ktp. Ĝi estis ege in-

stiga kaj ĝuiga, dank al lia bona preparado.

S-ro Lee estas Esperanto-instruisto kiu instruis min antaŭ 8 jaroj en Koreio. Li ege aktive movadas pri Esperanto (eble li kredas fin-venkismion). Nun li gvidas ĉirkaŭ 500 universitatajn studentojn al Esperanto. Dum la kursaro, li klarigis kiel allogi junulojn al Esperanto kaj kiel la Korea movado fartas. Krome, li pritraktis Koreajn malnovajn rakontojn kiel la studmaterialon. Certe en Koreio la nombro da Esperantistoj estas granda, kaj ili estas diversaj, kun multaj junuloj, kio spegulas helan estontecon.

S-ino Franceska Toubale: bedaŭrinde mi ne havis oportunon ĉeesti en ŝia klaso, ĉar ŝi gvidis la mezklason. Tamen, mi ofte renkontis ŝin en restoracio kaj aliaj lokoj. Mi kredas ke ankaŭ ŝi estas unu el la plej bonkoraj kaj intelektaj instruistoj kiuj nun povas reprezenti Aŭstralian Esperantion.

Laŭ la statistiko, partoprenis pli ol 80 Esperantistoj. La etoso estis ĉiam malstreĉiga kaj afabla. Mi kredas ke tiu glata progreso estis pro la forta laboro de bonaj organizantoj kiaj Terry Man-

ley kaj multaj aliaj. Ni, Sidnejanoj dubis ke ni vere kapablas okazigi la kursaron ĉi tie, tamen ni fine faris sufiĉe bone. Iuj el la elstaraj Esperantistoj, laŭ mi, estis la familio de Jasmin el Adelajdo. John estas la paĉjo kaj Lesley estas la panjo de tiu 5-jaraĝa knabino. Lesley estis en la komencanta kurso kaj John eklernis Esperanton jam antaŭ 3 jaroj. Jasmin, pro sia tro juna aĝo, eĉ ne provis lerni ĝin. Sed, kion ili montris dum la teatra prezento estis tiom aminda kaj mirinda! La familio prezentis pupteatraĵon nomatan "Akvomelonó". La pupino estis fabrikitita de John kaj la voĉoj de Lesley kaj Jasmin aŭdiĝis per sonbendo. Mi rimarkis ke Lesley legis Esperanton per Angla prononco, ekzemple, "imeĝis" anstataŭ "imadis". Tiaj estis beletaj eraroj laŭ mi, sed Jasmin havis pli perfektan prononcon, ĉar ŝi kopiis kion ŝia paĉjo diris el la malantaŭo.

Helen kaj Sandor el Adelajdo prezentis amuzan ĵongladon kaj humorajn 3 teatraĵetojn. Bernie, Francis-

ka, Marcel kaj Margaret el Melburno montris ege profesian teatraĵon, kiel kutime.

Kaj persone, mi ne povis forgesi renkontiĝon kun Maurice el Adelajdo. Li parolis 10 indiĝenajn lingvojn antaŭ 10 jaroj. Tamen, pro aŭtoakcidento okazinta al li en 1990, li perdis tiujn lingvojn pro la perdo de lia memorkapablo. Sed, li havas entuziasmon lerni Esperanton kaj li estas malrapide progresanta. Mi sentas tiom da ĝojo havi Maurice en nia Esperantio. Li, kiel indiĝena persono, povus fari grandan rolon unuigi Aŭstraliajn indiĝenajn popolojn kaj neindiĝenajn pere de Esperanto, mi esperas.

Krome, estas multaj aliaj menciindaj personoj kaj okazoj, tamen, mi ne listigu ĉiujn Esperantistojn kiuj ĉeestis.

Kiam la lasta tago de la kursaro venis, ni sentis bedaŭron pro la disiĝo de la samideanoj kaj pro la adiaŭo al bonĝustaj kaj internaciaj manĝaĝoj kiujn ni havis dum la restado en la Internacia Domo de Sidneja Universitato. □

PRI LA SOMERKURSARO KAJ KONGRESO

Raportas BOB FELBY

Pro longega vojaĝo de Adelajdo mi alvenis laca kaj malvarma al Sidnejo. Renkontis min en la ĉefstacidomo Margaret Chaldecott, mia gastigantino.

Hristo Metev, nia amiko el Adelajdo, Terio Manley, kaj aliaj, salutis nin kiam ni alvenis al Esperanto-Domo. Provinde iomete kunhelpi mi fine decidis trinki teon. Post tio Margaret kaj mi iris hejmen, ĉar mi estis lacega.

Sabato estis oficiale la unua tago de la aranĝo. Tiu ĉi estis verŝajne la unua Esperanto-kongreso en la nova jarmilo. Mi renkontis multajn gesamideanojn en Esperanto-Domo. Mi tre ĝojis, ĉar multaj el ili estis tre amuzaj. En la supra etaĝo ni ĝuis interkonan posttagmezon gvidatan de Maria Murphy. Iom poste la plej multaj el ni iris kune kun

Granda Mazi laŭ Lawson Street, mal-supren laŭ la ŝtuparo al la fervojaj personoj de stacidomo Redfern. En la trajno ni disdonis flugfoliojn pri Esperanto kaj la kursaro al ĉiuj pasaĝeroj. Ni eltrajnigis en stacidomo Circular Quay, de kie ni disdonante flugfoliojn iris por admiri la majstroverkon de la mondfama Dana arĥitekto Jørn Utzon, la Operejon.

Kelkfoje ni disiĝis, sed iel ni sukcesis trovi unuj la aliajn por kune reiri al Redfern.

Mi kuniris per ekskurso 1. Margaret Chaldecott kaj Ralph Harry komentaris la tutan tempon. La vidindaĵoj estis rave belegaj. Ni iris partopreni diservon en la Bahaa Templo, mirinde belega konstruaĵo. Plaĉe surprizis min ke la altestimata prezidanto de Espe-

ranto en Sudaŭstralio, lia moŝto Johano Gallagher, faris — en Esperanto — la enkondukon al la diservo. La diservo estis ekumena, aŭ pli ĝuste, ĝi estis por ĉiuj kredoj. Iu sinjorino voĉlegis tekstojn el la unua ĉapitro de la Bagavadgito, versojn 28 ĝis 46.

La plej granda travivaĵo dum la tuta ekskurso okazis kiam mi vidis du grandajn goanojn.

La ekskurso 3 estis sendube por mi la plej belega. Ni fojon post fojo vidis la maron. Ni vidis eĉ ie akvofalon grandegan. Ie ni vidis eĉ tiel nomitan aertruon. Estis truego en grandaj rokoj, kaj la torento de la maro puŝis la akvon tien kaj supren kun granda bruo. Eĉ belega vidaĵo!

Jen iom pri la kursoj. Estis entute tri niveloj plus la ekzamenpreparoj de Marcel Leereveld. Instruis s-roj Kane kaj Lee, ankaŭ nomita “ŝlosilo”, kaj Franceska Toubale. Ĉiuj geinstruistoj estas eksterordinare bonaj pedagogoj.

Reelektiĝis la estraro de A.E.A., kaj aldoniĝis al ĝi helpsekretario Johano Gallagher kaj helpkasistino Dianne Lukes.

[El *Tamen Plu* februaro 2000]

Postnoto: Ricevis la Ŝildon Koppel la Viktoriaj Esperantistoj pro sia prezento de la dramo *La naŭ veraĵoj*. Lesley Gallagher, kiel la plej progresema komencanto, gajnis la Libropremion honore al Tom Elliot.—Red. □

RAPORTO PRI LA FONDUSOJ DE AEA

de RON GATES

La fondusoj de Aŭstralio Esperanto-Asocio (tio estas, la kapitalaj monsumoj apartigitaj por specialaj celoj) nun sumiĝas al ĉirkaŭ \$170 000. En januaro 2000 la estraro ricevis provizoran raporton de laborgrupo kiun ĝi komisiis konsideri la uzon de la fondusoj. La estraro aprobis la rekomendon ke la raporto estu publikigita en *Esperanto sub la Suda Kruco*, kun invito al membroj de AEA sciigi siajn reagojn kaj ideojn.

La raporto estas do reproduktita ĉisube. La estraro petas ke vi konsideru ĝian enhavon kaj komuniku al la kasisito de AEA, Margaret Inglis, viajn opiniojn pri la kondiĉoj kaj procedo por la uzo de niaj fondusoj. (Ŝiajn adreson kaj retadreson vi trovos sur paĝo 31 de tiu ĉi numero de *ESK*.) Helpe de viaj komentoj, la laborgrupo poste preparos definitivan raporton.

ENKONDUKO

En januaro 1999 la Estraro de AEA komisiis al speciala laborgrupo la taskon ellabori procedon kaj kondiĉojn por la elspezo de mono el la fondusoj de AEA. Tiu decido sekvis debaton en la jara ĝenerala kunveno de AEA, pri fondusrilata raporto prezentita de la Kasisto.

La membroj de la laborgrupo estas Margaret Inglis, Edna Turvey, Max Wearing kaj Ron Gates. Pli detale, ili estis petitaj:

- (a) ekzameni la kondiĉojn kaj staton de la fondusoj;
- (b) eble proponi rearanĝon;
- (c) post peto pri ideoj de la membraro de AEA, difini la celojn kaj kondiĉojn por la elspezo de interezo aŭ kapitalo;
- (ĉ) fari raporton al la Estraro.

Sciigo pri la starigo de la laborgrupo aperis en la marto-aprila numero de *Esperanto sub la Suda Kruco*, kune kun invito al federacioj, kluboj kaj individu-

aj membroj sendi al la Kasisto ideojn por konsidero. Pro la manko de respondoj al tiu invito, la laborgrupo nun prezentas nur provizoran raporton kaj rekomendas ke ĝi estu diskonigita, por ke la membraro de AEA sciigu siajn reagojn. La laborgrupo poste revizios siajn konkludojn, kaj prezentos ilin al la Estraro por ĉi ties definitiva konsidero.

LA NUNA STATO DE LA FONDUSOJ

En *Adresaro 1998* aperas la ĉisuba informo pri naŭ fondusoj de AEA.

Fonduso Goldsmith: Memorigas al "Tiny" Goldsmith, Sekretario. Helpas pri informado kaj anoncoj cele varbadon de novaj membroj.

Fonduso Simpkins: Honorigas S-ron Simpkins, vojaĝinton al Aŭstralio, kiu heredigis al nia Asocio. Por helpi Esperanto-organizaĵojn en ilia agado. Interzo dediĉita al la Nacia Biblioteko.

Fonduso Matasin-Banham: Memorigas al John Matasin kaj Reg Banham. Por helpi pri la eldono de libroj verkitaj aŭ tradukitaj de Aŭstralianoj.

Stipendia Fonduso: Por helpi al membroj fari studvojaĝojn eksterlande, aŭ por ebligi vizitojn al Aŭstralio fare de personoj kiuj utilos al nia Asocio.

Fonduso de la Zamenhofa Jubileo: Helpas lokajn organizaĵojn akiri ejojn por kunvenoj, bibliotekoj k.s.

Fonduso Tim kaj Idyss Einihovici: Memorigas D-ron T. Einihovici de Perto. Helpas junulojn partopreni en kongresoj de Tutmonda Esperanto-Junulara Organizo (TEJO).

Fonduso Ralph Harry: Honoras D-ron Ralph Harry, kiu donacis \$5000 por starigi fonduson por plibonigi la instruadon de Esperanto en Aŭstralio per la akiro aŭ produkto de televidkursoj, komputilaj diskaj k.c.

Fonduso Muller/Muller-Soraŭ:

Memorigas la gefratojn Herta Muller kaj Fritz Muller-Soraŭ. La celo estas

subteno de elektitaj projektoj kiuj, laŭ la Estraro, antaŭenigos la Esperanto-movadon, precipe en Aŭstralio.

Fonduso por la Subteno de Esperanto sub la Suda Kruco: Ebligas pli oftan eldonadon de nia gazeto kaj daŭrigon de ĝia alta nivelo. Aldoniĝas jarsumo de \$1000 el la kapitalo de AEA, cele al riparado aŭ modernigo de la komputilaparatoj laŭ neceso.

Ekzistas ankaŭ du aliaj fondusoj: tiu, el kiu pagatas la kosto de *Esperanto sub la Suda Kruco* por dumvivaj membroj; kaj tiu, kies celo estas laŭŝajne la akiro de konstruaĵo por AEA.

La interzo gajnita de ĉiu el la fondusoj dum la financa jaro 1998-99, kaj la kapitala sumo en ĉiu el ili je la 30a de junio 1999, estas montritaj en la ĉisuba listo.

Fonduso	Kapitalo	Interzo	\$	\$
Goldsmith (informado)		\$3,144	\$262	
Simpkins (nacia biblioteko)		\$4,732	\$395	
Matasin-Banham (Aŭstraliaj eldonaĵoj)		\$6,708	\$528	
Stipendia (vojaĝado el/al Aŭstralio)	\$20 654	\$1 937		
Zamenhofa Jubileo (akiro de lokaj ejoj)	\$12,000	---		
Tim Einihovici (partopreno en TEJO-kongreso)	\$26 273	\$894		
Ralph Harry (instrumaterialo)	\$25 869	\$2 160		
Muller-Soraŭ (elektitaj projektoj)	\$51 530	\$4 162		
ESK (komputila aparato)	\$5 286	\$361		
Dumvivaj Membroj (kosto de ESK)	\$6 701	\$578		
Konstruaĵo (akiro)	\$5 862	\$489		

Kun unu escepto, rektan respondecon pri investado kaj elspezado havas la Estraro de AEA. La escepto estas **Fonduso Tim kaj Idyss Einihovici**, por kiu estas nomumitaj tri specialaj kuratoroj, kiuj respondas kaj pri la investado de la mono kaj pri la aljuĝo de la stipendio.

PRINCIPOJ KAJ PROPONOJ

La laborgrupo opinias ke aranĝoj por la administrado kaj uzo de la fondusoj devus konformi al kvar ĉefaj principoj.

(1) Estu ĝenerale diskonigita informo pri la celoj de la diversaj fondusoj, pri la sumoj disponeblaj, kaj pri la procedo de

propono kaj decido.

(2) Estu raportitaj periode al la membraro de AEA la elspezoj el la fondusoj kaj la uzoj faritaj per la mono.

(3) Estu starigitaj novaj fondusoj kiam montriĝas celoj ne plenumebaj per tiuj jam ekzistantaj.

(4) Estu invititaj donacoj kaj legacioj por antaŭenigi projektojn kiujn AEA rigardas kiel aparte gravajn.

(5) Estu aldonita al ĉiu fonduso, el la jara interezo, sumo sufiĉa por konservi ĝian realan valoron kontraŭ inflacio, kun escepto de tiuj okazoj en kiuj estas decidite elspezi parton de la kapitalo.

Pri la unua kaj dua el tiuj principoj, la laborgrupo proponas ke meze de ĉiu jaro, per anonco en *Esperanto sub la Suda Kruco*, la Estraro raportu pri elspezoj el la fondusoj dum la antaŭaj dek du monatoj kaj pri ilia nuna stato, kaj invitu proponojn por estontaj elspezoj. Kvankam la celoj de la diversaj fondusoj estas sufiĉe klare indikitaj en la listo prezentita en tiu ĉi raporto, la Estraro, farante la inviton, povos laŭ sia bontrovo specifi pli detale kiajn projektojn ĝi rigardas kiel plej gravajn.

El la dek unu fondusoj enlistigitaj supre, nur tiu pri la akiro de konstruaĵo por AEA havas kialon verŝajne pridubeblan. Ne nur estas la kapitala sumo bagatela en komparo kun la celo, sed ankaŭ, laŭ la opinio de la laborgrupo, estas pli grave ke ŝtataj kaj lokaj organizoj disponu taŭgajn ejojn por kunvenado, tenado de libroj, kaj tiel plu, ol ke ekzistu centra nacia agadejo en neŝanĝebla loko. Estas do proponate ke la kapitalo de la Fonduso por AEAa Konstruaĵo estu aldonita al tiu de la Fonduso de la Zamenhofa Jubileo.

Pri la kreo de novaj fondusoj, kaj pri la preferindaj uzoj de la nunaj, la laborgrupo faris mallongan liston de projektoj kiuj meritas pluan konsideron:

(1) antaŭenigo de la uzo de Esperanto en interreta komunikado;

(2) stipendio por ebligi al prezentisto en Esperanto (aktoro, kantisto, kaj tiel plu) vojaĝadon en kaj ekster Aŭstralio;

(3) subvenciado de instruposteno pri Esperanto en universitato;

(4) enkonduko de Esperanto en la preparan trejnadon de lernejoj instruistoj.

Estas sendube aliaj celoj egale indaj je konsidero.

PLUJ PAŜOJ

Kiel jam dirite, tiu ĉi raporto estas nur provizora, pro la manko de komunikadoj de la membraro de AEA responde al la invito en marto 1999. Estas grave nun elvoki tiajn ideojn. La laborgrupo do rekomendas al la Estraro ke tiu ĉi raporto estu publikigita en *Esperanto sub la Suda Kruco*, kune kun invito al organizoj kaj individuaj membroj komuniki siajn reagojn kaj ideojn al la Kasisto de AEA. La Kasisto poste aranĝos ke la laborgrupo preparu definitivajn rekomendojn por prezento al la Estraro.

ĜENERALA KUNVENO DE AEA

La jara ĝenerala kunveno de Aŭstralia Esperanto-Asocio okazis la 20an de januaro, kadre de la Sidnejaj kongreso kaj kursaro. Ĉeestis dek naŭ membroj.

Inter la aferoj pritrakitaj troviĝas la forpaso de Tom Elliott kaj de Herbert Koppel; la ŝanĝo de la statuto de AEA, sekve de kiu familiaj kaj asociaj membroj aĝaj almenaŭ dek ok jarojn nun havas voĉdonrajton; la akcepto de propono de Esperanto-Federacio de Viktorio organizi nacian somerkursaron en Melburno en januaro 2001; la provizora propono de Esperanto-Ligo de Okcidenta Aŭstralio fari same en januaro 2002; la raporto de la laborgrupo pri la fondusoj de AEA; kaj la uzo de la interreto

por komunikado kaj varbado.

La elektado de la estraranoj por la nuna jaro rezultis tiel: prezidanto, Ronald Gates; vicprezidantoj, Jennifer Bishop kaj Vera Payne; sekretario, Bob Felby; kasisto, Margaret Inglis; vicsekretario, John Gallagher; vickasisto, Di-
anne Lukes. □

Raporto de la Estrarkunsido de NZA

AFEROJ EL LA
ESTRARKUNSIDO DE LA 1A DE
DECEMBRO:

1) La Prezidanto kaj la Sekretario prezentis la Jarraporton por 1999. La estraranoj zorge studis ĝin kaj proponis kelkajn plibonigojn.

2) Ni diskutis erojn el la Strategia plano. Ni decidis ke ni bezonas helpi ekzistantajn klubojn kaj trovi metodojn pli allogigi ilin. Oni devus plani la kunvenojn por ke ili estu interesaj kaj ĝueblaj. Ni ankaŭ decidis ke regulaj reklamoj devus aperi en gazetoj kiaj *Listener*. Oni bezonas buĝeton por ebligiti tion.

3) La kunsido decidis ke la iniciativo pri Oceanio oni devus aldoni al la tagordo de la Komitatkunsido kiu okazos en Sidnejo.

4) Ni diskutis diversajn ideojn reklami Esperanton kaj konsideras organizi afiŝo-konkurson.

[Raportis Dennis Pease] □

RETPAĜO DE AEA

Dum la somerkursaro en Sidnejo samideanoj kuniĝis kaj decidis plibonigi nian retpaĝon. Laborgrupo konsistanta el Igor de Oliveira Couto, John Gal-

lagher kaj teknika helpanto Alan Turvey kunsidis kaj decidis ke la ĉefa celo, kadre de la konstitucio, estus varbi membrojn por UEA.

Dume, Ralph Harry donis ekzempleron de ĵus presita helplingva libreto kiu estas por partoprenontoj en niaj Olimpiaj ludoj. Tiun libron ni montros sur la paĝo por ke serĉantoj povu utiligi ĝin. Ni, de la laborgrupo, deziras kuragi ĉiujn reklami niajn novajn paĝojn. La adreso estas: www.esperanto.org.au.

Se la legantoj deziras kontrubui al nia paĝo, bonvolu sendu informojn al abcetc@ozemail.com.au.

Intertempe, eble vi ŝatus viziti la ĵempageton de Esperanto Sudaŭstralio ĉe: <http://www.ozemail.com.au/~esperanto>

kaj vidi mirindajn eblecojn de la Esperanto-mondo.

Memoru uzi www.esperanto.org.au sur ĉiuj viaj varbiloj, kaj informu nin pri specialaj projektoj viaj.

Raportis John Gallagher □

OCEANIA KOMISIONO APROBITA

La estraro de UEA aprobis la starigon de la Oceania Komisiono de UEA kun la jena konsisto:

Brian Fox, kunordiganto
Rosalie Schulze, membro
Dietrich Weidemann, membro
Kep Enderby, membro
Renato Corsetti, membro

La adreso de Brian Fox, la kunordiganto, estas:

Brian Fox, 634 South Titirangi Road, Titirangi, Auckland 1007, Nov-Zelando.

brianandjackie@abztrak.co.nz

Ĉiu Esperantisto kiu havas intereson pri disvastigado de Esperanto en la Pacifika regiono, aŭ havas indikojn pri Esperantistoj loĝantaj en tiu regiono, [kompreneble ne en Aŭs-

traliao kaj Novzelando!—Red.] bonvolu kontakti ĝin. Oni povas fari tion ankaŭ per mesaĝo al <oceanio@egroups.com>.

POR RIDIGI VIN

“Mia edzino konstante kolerigas min rakontante pri sia unua edzo.”

“Tamen vi ja povas dekutimigi ŝin de tio.”

“Kiamaniere?”

“Komencu paroli pri via estonta edzino.”

el *Litova Stelo* n-ro 4/1999,
laŭ *Eventoj*, n-ro 177, 1/januario-2000

INTERVJUO KUN KEP ENDERBY

La Redakcio de la rusia Esperanto-gazeto *La Ondo de Esperanto* elektis la prezidanton de UEA Kep Enderby “La Esperantisto de la Jaro 1999”. Lige al tio la redakcio faris intervjuon kun li, kiu aperis en “La Ondo de Esperanto”. 2000: 2 (64) —

Lode: Kiel impresis vin la informo ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro?

Enderby: Unue, kun grandaj surprizo kaj miro. Memoru ke mi Esperantiĝis nur en 1987. Kompare al multaj aliaj, mi estas relative novbakita Esperantisto.

Tamen, mi taksas ĝin granda honoro kaj provos pavigi ĝin.

Lode: La internacia elektantaro aparte menciis pri du flankoj de via aktivado: komunuma (aktiva partopreno en Esperantistaj kongresoj: UK, SAT, Azia kaj naciskale) kaj movada (precipe la sukcesa pledo por Esperanto en la Internacia Konferenco de Neregistaraj Organizaĵoj en Seŭlo). Kia, laŭ via opinio, devas esti la ekvilibro inter la interna kaj ekstera flankoj de la vivo Es-

perantista?

Enderby: La respondo grandparte dependas de decido de la individuo, ĉar tia ekvilibro estas afero de juĝo. Ĝenerale, vidate de la vidpunkto de la Esperanto-movado, ege gravas kapablo sufiĉe bone regi la lingvon, kaj tio bezonas tempon. Kontraŭe, samtempe egale gravas movade la kapablo eksponi al neesperantistoj la valorojn de la uzo de Esperanto por komuniki kun alilingvanoj. Kadre de tio, ege gravas la estimo de konatoj en la neesperanta mondo.

Rimarku, ke mi ne uzas la esprimon *internacie* ĉi tie, ĉar, parolante tute persone, kaj, mi esperas, honeste, malgraŭ ĉiuj aktualaj problemoj en la mondo — tiom ofte kaŭzataj de la malbeno de politikoj de aparteco aŭ de identeco — mi persone kredas ke la koncepto de nacioj estas artefarita. La celo de Esperanto estas pliharmoniigi la popolojn de la mondo kaj ne helpi en la disigado de ili.

Lode: Kiujn tendencojn en la nuntempa Esperantio vi opinias plej subtenindaj?

Enderby: Ĉiujn kiuj celas la atingon de la baza idealismo de la origina Esperanto-ideo. Ĉi tie mi aludas ne al la distingo inter, ekzemple, finvenkismo kaj raŭmismo, nek al la respektivaj meritoj de tiuj du Esperanto-skoloj aŭ -vidpunktoj, sed al la espero ke ĉiuj homoj, interlingve, sen rigardo al lingvaj, rasaj, aŭ aliaj etne similaj kulturaj baroj, vivu laŭ spirito de frateco.

Lode: Dankon. Kaj kion vi opinias negativa?

Enderby: La kontraŭajn de tiuj kiujn mi ĵus menciis: ĉiujn kiuj elmontras mankon de toleremo al aliaj kaj al tiuj aliaj vidpunktoj kaj tendencoj: alivorte, tiujn kiuj sektigas Esperantistojn. La homa naturo estas tia kia ĝi estas, la elekto inter la du ne ĉiam estas facila.

Lode: Al kiu(j) persono(j) vi mem donus via(j)n voĉo(j)n, se vi estus elek-

tanto ĉi-jare?

Enderby: Tio estas malfacilega demando. Fakte, spite de mia plezuro ricevi tiun honoron, mi havas dubojn pri la meritoj de sistemoj laŭ kiuj honoroj estas donataj. Honoraj sistemoj havas kaj pozitivajn kaj negativajn flankojn. Sendube devas esti multaj, multaj aliaj meritindaj Esperantistoj, nekonataj de mi, kiujn estus malĝuste preterpasi. Ne ĉiuj el ili estas anoj de UEA. Tamen mi opinias ke se oni volas doni tian honoron al homo, escepte laŭ eksterordinaraj cirkonstancoj, oni devus ne doni ĝin al profesia Esperantisto, kiom ajn meritoplena li estas.

Se vi premas min, inter miaj konatoj, estas multaj kiuj meritas tian honoron. Mi pensus pri iuj el miaj kolegoj en UEA, ekzemple Renato Corsetti kaj Miĉela Lipari. Menciindaj ankaŭ estus Mark Fettes, Lee Ĉong-Yeong, Yamasaki Seikŝ, Giorgio Silfer, kaj Paŭlo Desailly. Mi ĝojas ke mi ne devas fari konkretan decidon.

LOdE: Iam populara demando: kiujn tri librojn en Esperanto vi kunprenus, estante ekzilita al neloĝata insulo?

Enderby: Respondo dependus de kiom longe mi restus sur la insulo. Sufiĉus diri ke mi unue pensus pri *La danĝera lingvo*, *La Dekameron* kaj *Sed nur fragmento*.

LOdE: Kion vi opinias pri la estonteco de Esperanto?

Enderby: Nepre bonega, kvankam, ĉar mi ne estas aŭguristo, pri detaloj mi ne volas konjekti. La baza ideo de Esperanto restas bonega kaj ĝi inspiris multajn homojn dum la pasinta jarcento. Tio daŭros, kaj sendube la mondo estus pli bona loko, se pli da homoj uzus Esperanton. Tamen oni devas memori ke

uzata lingvo estas multe pli ol lingvo elektita de uzanto. Ĝi estas identigilo. *Lingvo* ankaŭ estas formo de superstrukturo, multe influita de la ekonomika kaj socia bazo, testamentita al popoloj kiuj vivtenas sin kadre de tiu ĉi heredita ekonomika kaj socia bazoj. Kontraŭe, iagrade, *lingvo* reciproke influas tiujn ekonomikan kaj socian bazojn.

La rezulto estas ke okazas speco de objektiva historia procedo en kiu la personaj voloj kaj preferoj de homoj rolas multfoje nur marĝene, kvankam kelkfoje grave. Ankaŭ politikistoj havas siajn proprajn rolojn. Ankaŭ ŝanco ludas gravan rolon. Ĉiurilate, la kaŭzoj de la nuntempa hegemonio de la angla lingvo memevidente konfirmas ĉiujn tiujn faktorojn. Ĉu tiu hegemonio daŭros, mi ne scias. La racio favoras Esperanton, sed la racio ne ĉiam regas en la reala mondo. Intertempe, Esperantistoj ĉie — ĉu anoj de UEA, ĉu de SAT, ĉu ano de iu ajn speco de alia Esperanto organizo — devus strebi alvoki al tiu racio kaj plejefektivigi la realajn, idealismajn kaj praktikajn valorojn de Esperanto kaj eksoni tiujn al la cetera mondo. La monda Esperantistaro estas minoritato ĉie, sed tio ne signifas ke ĝi devas esti sen influo laborante por plibonigi la mondon.

LOdE: Ĉu vi havas komentojn pri la kvar kritikaj rimarkigoj faritaj en “Esperanto en 1999”?

Enderby: Nur por diri ke vi pravis. Mi neniam sugestis ke la tasko faciligis.

[Intervjuis Aleksander Korĵenkov. Adreso: RU-620014, Jekaterinburg-14, p.k.162, Ruslando. <sezonoj@mail.ru>]□



UNIVERSALA KOMPUTILA LINGVO

de AGOP ORMANĜIAN

Multaj nekredeblaj fenomenoj iniciatitaj en la 20a jarcento tre verŝajne estos realigitaj dum la 21a.

Post multaj ŝanceliĝoj, duboj, pesismaj prognozoj (elekstere), sed ne ankaŭ sen scienca kaj teknologia optimismoj, dum aprilo 1996 en Tokio 120 ekspertaj komputilspecialistoj kaj lingvistoj komencis realigi unikan projekton: la kreado de universala komputila lingvo de la monda komputila reto, kiu havas la inicialojn UNL (Universal Network Language).

Preskaŭ du jarojn la scienca grupo laboris diskrete, sen fanfaroni pri si, ĉar en la komenco la prognozoj estis ege malĝojigaj. Dum la tria jaro ekde la verkado de la projekto, jam estas fakto la unuaj realigitaj ideoj. La celo estas klara, la metodoj por ĝia realigo — ankaŭ. Bone estas ke al la sciencistoj kaj special-istoj ne mankas kaj volo kaj optimismo.

Kia estas la tasko de la projekto? Pere de la Interreto la homoj el ĉiuj regionoj de la mondo povu interkorespondi kaj interŝanĝi informojn en sia gepatra lingvo, trabor-ante la lingvajn barierojn. La universala komputilingvo estos la peranto (tradukanto) de unu lingvo en alian.

La principo por la kreado de UNL estas inversa al maŝina tradukado, kiu fariĝas de lingvo al lingvo. Per la nova metodo, oni submetas al komputila redaktado parton de teksto de kiu ajn lingvo kaj transformigas ĝin en universalan komputilan lingvon, kiu povas sin mem tradukadi en kiun ajn alian lingvon. Aperas demando: ĉu eblas ke oni traduku ĉion pere de tiu lingvo?

“La lingvo de UNL ne estas kreita por traduki la lingvon de Ŝekspiro, la sone-tojn de Petrarko aŭ la filozofiajn verkojn de Sokrato”: tio estas la ĉef-

principo en la gvidaj principoj de la projekto.

Per tiu universala komputila lingvo en pli malproksima estonteco oni povos traduki ankaŭ la filologiajn tekstojn kaj sciencajn traktatojn, sed ĝin pleje oni uzos por la bezonoj de la komerco, politiko, informado kaj scienca interŝanĝo.

La teknologia skemo de UNL estas jena: kiam iu skribos ion per komputilo en sia gepatra lingvo kaj volos ĝin sendi per la Interreto al malsamlingvula kolego en alia parto de la mondo, UNL tuj akceptos la tekston, ĝin prilaboros, tradukos ĝin en sian universalan lingvon kaj ĝin resendos al la aŭtoro en lia gepatra lingvo. Tio ebligos al li korekti la tekston kaj esti certa ke la tradukita teksto ĝuste kongruas (spegulas) liajn pensojn. Nur tiam oni sendos la tekston al la konsumanto.

Ĉio ĉi okazos en kadroj de du-tri minutoj (plus la tempo necesa por la korektado).

“La universala lingvo havas celon pere de komputilo kaj la Interreto krei komunikajn eblojn por la malgrandaj naciaj kolektivoj kies lingvoj estas pli malofte uzebaj” klarigas unu el la kreadantoj de la projekto

En la daŭro de kvar jaroj oni realigos la unuan etapon de la projekto. Oni celas trovi la ĝustajn formojn kaj rime-dojn por UNL-traduk-ado al 16 lingvoj, inter ili la ses oficialaj lingvoj de UN: la Angla, Araba, Ĉina, Rusa, Franca, kaj Hispana; ankaŭ la Germana, Hinda, Indonezia, Itala, Japana, Latva, Mongola, Portugala, Suahila, kaj la Taja. La dua etapo de la projekto ampleksos aliajn lingvojn. Oni antaŭvidas ke ĝis 2005 la membrolandoj de UN akceptos kaj proklamos UNL-n kiel komunuzeban. Tio estos epokfara atingo de la sciencetknika penso, kies komenco estas

farita en la 20a jarcento kaj estas finota en la 21-a jarcento.

Tradukis Jordan Ĉaljovski
[el *Bulgara Esperantisto* 4/99,
per la Interreto.]

Postnoto de la redaktoro: Estas malfacile vidi fundamentan diferencon inter ĉi tiu projekto kaj la projekto DLT (mortinta antaŭ dekelko da jaroj); la ĉefaj diferencoj ŝajnas esti: (1) ke oni reŝendas al la aŭtoro de artikolo retradukon de la artikolo en ĉi ties propra lingvo, por kontroli la ĝustecon de la tradukmetodo. Kaj (2) ke DLT utiligis Esperanton kiel la perilan lingvon, dum UNL ŝajne uzas maŝin/komputil-lingvon.—DB.

MORTINTAJ ĈEVALOJ

Saĝaĵo de la Dakotaj Indianoj instruas: “Kiam vi trovas ke vi rajdas ĉevalon mortintan, degripmu.”

En profesia vivo ni ofte klopodas pri aliaj strategioj trakti tian situacion:

- Ni mendas pli fortan vipon.
- Ni anstataŭigas ĉiujn rajdistojn.
- Ni asertas: “Tiel ni jam de ĉiam rajdadas tiun ĉi ĉevalon.”
- Ni starigas komisionon kiu analizu la ĉevalon.
- Ni vizitas aliajn lokojn por vidi kiel oni tie rajdas mortintajn ĉevalojn.
- Ni altigas ĉiujn kvalitatajn normojn rilate la rajdadon de mortintaj ĉevaloj.
- Ni starigas portaskan taĉmenton por revivigi la mortintan ĉevalon.
- Ni intermetas trejnadan kurseron por lerni pli bone rajdi.
- Ni okazigas ĝisdetalan komparon de diversaj mortintaj ĉevaloj.
- Ni modifas la kriteriojn por decidi ĉu ĉevalo estas mortinta.
- Ni luas eksterajn specialistojn por rajdi la mortintan ĉevalon.
- Ni kunligas plurajn mortintajn

ĉevalojn, por ke ili kuru pli rapide.

- Ni proklamas: “Neniu ĉevalo povas esti tiom morta ke oni ne plu batu ĝin.”
- Ni liberigas monrimedojn por altigi la forton de la mortinta ĉevalo.
- Ni komisias studaĵon fare de konsilistoj por trovi ĉu troveblos malpli kostaj konsilistoj.
- Ni aĉetas kromaĵon promesantan plirapidigi mortintan ĉevalon.
- Ni klarigas ke nia ĉevalo en stato morta estas “pli bona, pli rapida kaj pli kostoŝpara”.
- Ni fondas studcirklon por trovi konvenan utilon por mortintaj ĉevaloj.
- Ni difinas por la kontado apartan kostorubrikon por mortintaj ĉevaloj.

(Ĉi tiu konsilario pendis en oficejo de direktoro en BASF.)

Tradukis Simono Pejno.

Repesita el veki@onelist.com

VEKI=Virtuala Esperanto-Klubo Internacia

(<http://www.esperanto.org.br/veki>) □

LIBROJ RICEVITAJ

Priparolas DONALD BROADRIBB

William Auld: *William Auld 75 jaroj. Aŭtobiografio, poemoj, bibliografio.* Red. Aleksander Korjenkov. Jekaterinburg: Sezonoj, 1999. 48p + 8 paĝoj da fotoj; broŝ. Takso: ☹☹☹☹☹

Mankas enhavotabelo, sed enestas tre interesa aŭtobiografio 19-paĝa, plus 18 originalaj kaj 11 tradukitaj poemoj, plus 4-paĝa listo de libroj verkitaj, tradukitaj, aŭ redaktitaj de Auld. Kiu deziras koni nian tre eminentan poeton pli detale, kaj gustumi liajn poemojn, tiu trovos ĉi tiun broŝuron tre havinda.

Gunnar Gällmo: *Mokrokalvo la gigantegego*, de . Skövde (Svedio), Alfap-et-o, 1999. 72p. broŝ. Takso:



Mi antaŭe ne renkontis la nomon Gunnar Gällmo, sed mi esperas ofte renkonti ĝin, ĉar temas pri tre multe talenta originala verkisto Esperantista.

“Mokrokalvo” estas rakonto de tradicia Nordia mitologio, redonita en Esperanto. Tamen, ĝi ne estas simpla rerakonto. La verkinto enverŝas multajn komikajn, parte seriozajn, kaj tre seriozajn komentojn dum sia rakontado, por distri, edifi, kaj kelkfoje instrui la leganton. Ekzemple: Dum rakontado pri sia propra agado, la Nordia tondrodio Toro diras:

“Kaj alia afero kiun mi ne kapablas kompreni estas kiel vera Ragnaroko [la fino de la mondo] povos esti se Lokio [malliberigita figiganto] tiam ne estos libera, ĉar tiukaze ni bonaj potencoj ja ne havos dignan kontraŭstaron, kaj kia amuzo estus tiam la fina pereco de nia mondo?”

“Nu, tamen, doni Idunan [provizantino de etern-junigaj pomoj] al Ĉacio [giganto], tio ja ne estus tre ĝentila faro al ŝi, nek al Bragio, kiu estas ŝia edzo; sed treege ĝentila faro ankaŭ ne estus al ni aliaj dioj, ĉar nian eternan junecon, tiun ni posedas fakte nur tiel longe kiel ni povas frandi la pomojn de Iduna.

“Sed veraj, bonkvalitaj pomoj devas esti. Se oni havas nur tiajn modernajn pomojn envaksitajn, kvazaŭ plastajn -- kial oni tiam vivu? ‘Golden Delicious’ -- fiaĉ!”

Facile komprenata laŭalfabete ordigita listo de la nomoj kun necesaj informoj pri ĉiu el ili troviĝas ĉe la fino de la libro.

Ensume, tre leginda kaj havinda. □

POR RIDIGI VIN

“Trespassers will be violated.” (Afiŝo en loĝkvartaleteto en Sacramento California)

El esperanto USA 2/1999

LAŬ MIA VIDPUNKTO

Edifa rakonto:

Kiu estas Ĝivo?

de Bob Felby

Mi mian tutan vivon scias — vi verŝajne ne — ke kristnaskan vesperon, la 24-an de decembro, ĉiujare laŭ la kuranta kalendaro, ĉiuj bestoj scipovas paroli. Kompreneble mi eĉ tre bone scias ke kiu ajn besto scias paroli kiam ajn, sed permesu al mi emfazi ke la 24-an de decembro, aŭ eĉ pli bone, la 25-an de decembro, ĉar ili parolas nur post noktomezo, kaj nur unu horon, do nur inter la 24-a kaj 1-a horo, ili parolas homan lingvon.

Tiu ĉi fakto ne estas universale sciata, kaj ne gravas al mi ĉu vi min kredas aŭ ne. Via nekredemo ŝanĝas nenion en la mondo. La bestoj, kiel mi ĉiam scias, komprenas ĉiujn homajn lingvojn kaj parolas multajn. Nur homoj ne komprenas tion.

Nu, tio kion mi volas rakonti al vi estas la sekvanta: La pasintan kristnaskovesperan tagon mia edzino, Audrey, kaj mi pasigis en la hejmo de nia filino. Ni ĉiun kristnaskon faras tion, ĉar ni ĉiun kristnaskon fariĝas Luteranoj, kaj fakto estas ke la plej multaj Luteranoj celebras la naskiĝon de Jesuo ekde la 16-a horo la 24-an de decembro.

Necesas agnoski ke neniu el ni estas bona Luterano. Mia filino havas du filojn, kaj ni havas du nepojn, kia koincido, ĉu ne? Tiuj du junaj knaboj, kiel ankaŭ ĉiuj maljunuloj, estas ekscititaj pro kristnasko, kaj ne povas atendi ĝis la 16-a horo. Mia filino do alvenas al nia domo je la 11-a horo, kaj invitas nin en sian aŭton. Bedaŭrinde, nia ĉarma hundo, Ĝivo, ne rajtas kuniri, ĉar li estas virhundo, kaj ĉar nia filino havas proksimume 13 hundojn el kiuj nur tri

estas viraj, la ceteraj estas belaj hundinoj, Ĝivo ekscitiĝas kaj, kiel esprimas sin mia filino, “malsekigas en la anguloj de la loĝoĉambro”.

Do Ĝivo restas hejme kaj prizorgas Kleopanjon, la katinon.

Inter la 11.30-a kaj la 17-a horo ni do — pardonu la neologismon — “julis”. “Julo” estas la Skandinava vorto uzata, ĉar ĝi ne estas kristana. Ĉiu scias ke preskaŭ neniu celebras la naskiĝon de Jesuo, oni nur plenigas siajn stomakon kaj intestojn per viando kaj ebriligiloj. Ankaŭ ni, kompreneble ni ne manĝis viandon kaj trinkis alkoholon, sed ni manĝis kaj trinkis. Ni eĉ sekvis la tradicion kaj manĝis troe.

Mia filino veturigis nin hejmen. Kleopano iomete ignoris nin, kaj kial ne? ni ja ignoris ŝin la tutan tagon. Sed Ĝivo tre brue salutis nin pro ĝojo ke ni fine revenis.

Ni do rigardis kelkajn filmojn laŭ la televidilo, kaj trinkis teon, almenaŭ unu el ni trinkis, kompreneble, senkafinan teon.

Enlitiĝinte proksimume je la 23.30-a, almenaŭ mi tuj endormiĝis, ĉar mi estas lacega pro la troa manĝado. Subite vekis min eta blanka piedeto kun malmolaj ungegoj, kaj ĉarma voĉo diris, “vekiĝu, venu en la loĝoĉambron, mi volas paroli kun vi!” Tio estis mia eta ĉarma blanka Ĝivo, kiu akurate je la noktomeza horo retrovis sian homan voĉon, kaj feliĉe por mi decidis paroli en Esperanto.

Enveninte en la loĝoĉambron ni fermis la pordon por ne ĝeni la dormemajn Audrey-n kaj Kleopanjon. Ni ambaŭ sidigis komforte en brakseĝo, kaj Ĝivo ekparolis: “Unue, bonan kristnaskon al vi, kiun mi nun konsideras mia patro. Vi eble ankoraŭ ne rekonas min, sed antaŭ nur malmultaj jaroj vi ĉiam nomis min Paĉjo. Kiel vi sendube ankoraŭ memoras, mi forlasis la korpon de via patro en decembro 1974, do precize an-

taŭ 25 jaroj.”

“Kaj per kio vi okupis vin dum tiuj multaj jaroj?” mi demandis.

“Mi strebis revidi vin, ĉar ĉiam plaĉas al mi dividi mian vivon kun vi. Mi do reenkarniĝis en Aŭstralio, ĉar tie vi subite deziris loĝi. Mi ne rajtis fariĝi homo, ĉar juĝante laŭ mia pasinta vivo la Providenco konsideris min ne inda. Mi do revenis sur la teron kiel ora fiŝo en via hejmo. Ni amis unu la alian ĝis mi mortis kiel maljuna fiŝo. Tiam mi fariĝis kobajo, mi estis tiu el viaj kobajoj, kiu havis tre longajn nigrajn harojn. Poste mi fariĝis unu el viaj kunikloj. Tiam mi estis kelkajn jarojn unu el viaj galahoj, mi estis tiu kiu ĉiam diris “saluton”, kaj ĉiam mordis vin. Multajn fojojn mi estis kato en via familio, kaj nun mi havas la plezuron esti via eta blanka hundo Ĝivo. Laŭ la Providenco mi devas daŭrigi kiel besto ĝis vi ĉesos mortigi min antaŭ ol venos mia horo.”

“Kion devas tio signifi?” mi demandis.

“Tio devas signifi” daŭrigis Ĝivo, “ke la Providenco donas al mi, ĉiun fojon, certan nombron da tagoj, horoj kaj minutoj, kiujn mi devas travivi ĉu mi suferas aŭ ne. Ne gravas ĉu doloras, eĉ doloregas al mi, mia sorto estas tia ke mi devas suferi tiom kiom, laŭ la Providenco, estas bone por mi. Se vi daŭre pagos la bestkuraciston por ke tiu mortigu min, mi neniam havos oportunon fini mian vivon kiel besto, mi konstante renaskiĝos kiel unu el viaj dorlotbestoj. Estas ankaŭ malbone por vi, ĉar se vi ĉiam mortigos, ankaŭ vi estos mortigita, se ne en tiu ĉi vivo, do en iu el la venontaj, kaj se tio okazos, mi ploros, eĉ ploregos!”

Nu kompreneble, tio timigis min, kaj mi do demandis Ĝivon: “Kion mi do devas fari por ne esti mortigita?”

“Vi devas nur ami kaj protekti min” respondis Ĝivo. “Ĉu ne estas facile por vi ami min?”

“Jes, eĉ treege facile.” mi respondis, “vi estas la plej bona amiko kiun iu ajn povus havi.” “Mi memoras kiam vi surprizis min kiam vi decidis fariĝi vegetariano” daŭrigis Ĝivo. “Tamen sciu ke la plej granda merito de vegetariano estas tiu: ke li ne kaŭzas morton al sendefenda kompatinda besto. Neniu fariĝu vegetariano pro propra egoisma kaŭzo, sed por tiu de la kompatindularo. Eĉ tre necesas esti bonega al la bestoj, ĉar vivante kiel bestoj vi homoj esprimas deziron esti besto, kaj la Providenco plenumas ĉiujn viajn dezirojn!

“Dankon!” mi diris. “Diru al mi kio okazis al vi tuj post via elkarniĝo?”

“Mi subite troviĝis antaŭ la ŝtupetarego de Jakobo, vi scias pri ĝi, ĉu ne? Estas tiu ŝtupetarego kiu de la tero atingas la ĉielon. Mi devis supreniri laŭ ĝi en la ĉielon. Staris belega simpatia anĝelo ĉe ĝia piedo, li donis al mi pecon da kreto, per kiu mi krucigu la ŝtupojn, unu krucon por ĉiu el miaj pekoj.

Mi suprenkuris, ĉar mi kiel elkarniĝinto ne plu suferis pro mia malsana koro. Mi estis preskaŭ duonvoje al la ĉielo, kiam mi renkontis Frederikon la 9-an, la Danan reĝon, kiu mortis antaŭ proksimume 30 jaroj. Li survojis malsupren, ĉar li bezonis multe pli da kreto. Li fakte pasigis la pasintajn 30 jarojn grimpante supren kaj malsupren laŭ la ŝtupareto!”

“Vi do almenaŭ jam unu fojon vizitis la ĉielon. Kia ĝi estas?”

“Ĝi estas belega, estas tie multaj vojoj borderitaj de belegaj arboj. Sur la vojoj iras aŭtobusoj, tute senbrujaj kaj sen-

odoraj. Ĉiu trovas sidlokon en ili, kaj neniu devas pagi. Ĉiu estas feliĉa. Okazas multaj koncertoj tie. Ili okazas eksterdome, subĉiele en la parkoj.”

“Kian muzikon oni ludas en la ĉielo?”

“Oni ludas la plej belegan ĉielan muzikon, kian vi povas nur imagi. Miloj da homoj venas por aŭdi. Ili venas eĉ el la infero por aŭdi. Ĉe la enirejo al la ĉielo ili devas ŝanĝi aŭtobuson, ĉar la bruaj kaj fiodorantaj aŭtobusoj ne rajtas eniri la ĉielon. Ili estas akceptataj nur en la infero kaj sur la tero!

“Multaj homoj al kiuj tre plaĉas bruoj kaj fiodoro rifuzas veturi per la aŭtobusoj, ili do piediras, tio estas ilia maniero demonstri kontraŭ la naturo!

“Ĉie sur la vojo aŭdiĝas muziko kaj kantado. La koncerto ĉiam okazas en la mezo de la ĉiela parko, kaj ju pli proksimen oni venas al la parko, des pli belega la muziko fariĝas.”

“Ĉu oni do ne aŭdas la tiel nomitan rok-muzikon en la ĉielo?”

“Ne, certe ne, ĝin oni aŭdas nur en la infero. Se rok-muziko estus bonvena en la ĉielo, la anĝeloj preferus loĝi en la infero!”

“Diru al mi,” mi diris, “ĉar vi scias tiom multe, kiu el niaj parencoj estas Kleopano?”

